

KUNVOKO al la Membrokunsido la 7-an de majo 2022

La membrokunsido estas kunvokita sabaton, la 7-an de majo 2022 inter la 14^a00 kaj la 17^a00. Ĝi okazos ĉeeste en Greziljono kaj kiel aŭd-vida interreta kunveno.

La voĉdonoj okazos interrete (per la retejo balotilo.org) antaŭ kaj dum la kunsido. Societano, kiu ne povas aŭ ne volas voĉdoni per la retejo balotilo.org, bonvolu sendi sian voĉdonilon per poŝto aŭ retmesaĝo.

Tagordo

- 1) Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) Nombro de la ĉeestantoj,
- 3) Evoluo de la nombro de societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) Agadraporto 2021,
- 5) Financa raporto 2021, aprobo de la kontoj de la jaro 2021,
- 6) Imputo de la profito 2021,
- 7) Buĝeto 2022,
- 8) Kvitigo de la Komitato,
- 9) Rezulto de la voĉdonoj statutaj,
- 10) Rezulto de la elektoj por la Administra Komitato,
- 11) Programo 2022,
- 12) Aliaj demandoj.

3) Evoluo de la nombro de societanoj

La nombro de societanoj iomete progresis: 251 la 31-an de decembro 2021 kontraŭ 248 unu jaron antaŭe, kun 866 societaj partoj A (po 16 €, kontraŭ 852 fine de 2020), danke al 11 novaj societanoj kaj malgraŭ 2 forpaso, 2 fordonoj de partoj, 4 perdoj de societaneco. Progresis precipe la nombro de partoj B: 24 societanoj aĉetis 176 societajn partojn B (po 200 €), kio kreskigis je 28% nian societanan kapitalon.

4) Agadraporto

La jaro 2021 estis ree perturbita pro la sanitara krizo, kiu devigis nin nuligi staĝojn kaj luojn de printempo, sed ni okazigis nian kutiman agadon la reston de la jaro. Parto de niaj elspezoj dependas de nia agado kaj sekve reduktiĝis, ni ricevis ŝtatan helpon kaj ni profitis la situacion por daŭrigi la renovigajn laborojn, kiujn ni surprenas de kelkaj jaroj, kaj ankaŭ la beligon de la bieno.

La ludonojn kaj la staĝojn prizorgis 8 administrantoj kaj aliaj personoj. La kuiradon prizorgis Thierry Charles. La purigadon prizorgis Véronique Koalal kaj Christelle Perrot.

En la jaro 2021, la kastelo estis okupita dum 249 tagoj, t.e. 70% de la tempo: 66 tagoj de esperantistaj eventoj, 11 tagoj de ne-esperantistaj eventoj, 68 tagoj de ludonoj, 98 tagoj de konstrulaboroj kaj 6 tagoj por la jarkunveno kaj komitatkunvenoj (ofte telefone aŭ rete). Inter januaro kaj decembro, inkluzivante la kvarantenojn, 41 el la 52 semajnfinoj estis okupitaj. Vidu la agadon rete sub: gresillon.org/a2021.

Pro la koronaviruso, dum la periodoj de kvaranteno kaj de malcerta sansituacio, nuliĝis unu staĝo (Printempas) kaj 6 luoj. Sed ree sukcese ni alfrontis tiun situacion. Ni daŭre aplikas sanitaran protokolon kiu ebligis uzi la lokojn en tuta sekureco.

- Al la staĝo Printempas aliĝis 12 homoj antaŭ la kvaranteno, sed la staĝo nuliĝis.
- De la 25^a ĝis 30^a de majo, la ĥora staĝo de Interkant, gvidata de Zdravka Bojčeva, kunigis 16 kantistojn.

La someraj staĝoj okazis dum 34 tagoj en julio kaj aŭgusto kaj kunigis 137 personojn.

- De la 5^a ĝis 9^a de julio, la 2^a Verda Naturisma Semajno kunigis 13 aliĝintojn e-istajn kaj aliajn naturistojn.
- La 7^a semajno de reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj de la 12^a ĝis 22^a de julio kunvenigis 44 aliĝintojn.
- La 5^a maratona Esperanto-kurso, kun Ilona Koutny, Renée Triolle, Marc Giraud, paralele kun la 33^a Internacia E-Konferenco kaj la 75^a AMO-seminario, akceptis 32 lernantojn, de la 23^a de julio ĝis la 2^a de aŭgusto.

- La 11^a festa semajno por infanoj kaj familioj, de la 2^a ĝis la 12^a de aŭgusto, kun Jean-Luc Kristos kaj Gunter Neue kiel instruistoj, gastigis 23 staĝanojn, el kiuj 10 infanoj 2- ĝis 13-jaraj.
- De la 18^a ĝis la 25^a de oktobro, 23 staĝanoj partoprenis la mult-aktivadan aŭtunan renkontiĝon kun ĥorkantado (Zdravka Bojĉeva), Esperanto-biciklistoj de BEMI (Olivier Buisson) kaj Esperanto-kurso (Gunter Neue).
- La 10-a staĝo AŬTUNE, de la 25-a de oktobro ĝis la 3-a de novembro, kunvenigis 20 staĝanojn, inter ili 4 infanojn, kun Esperanto-kursoj gvidataj de Szabolcs Szilva kaj Gunter Neue.

Sume, en la jaro 2021, dum la 55 tagoj de staĝoj, ĉeestis 209 homoj (205 en 2020, 275 en 2019, 279 en 2018, 278 en 2017, 254 en 2016, 242 en 2015, 204 en 2014) por 3 666 manĝoj kaj 1 371 tranoktoj.

Ni memorigas, ke la prezoj de la staĝoj ne plialtiĝis de dek jaroj kaj ke duon-tarifo validas por infanoj, junuloj, senlaboruloj kaj personoj kun malaltaj vivrimedoj, celante instigi esperantistojn al vizitado. Bonvolu informi pri tio viajn konatojn.

Krom la staĝoj organizataj de la Kulturdomo, kvin aliaj eventoj estu menciataj:

- De la 12^a ĝis 20^a de junio okazis semajno de esperantlingvaj biciklistoj de BEMI, organizita de Lars Sözüer, kun deko da biciklistoj.
- La asocio FestiNATUR', prezidata de Jean-François Feunteun, organizis la 1^{an} festivalon « Naturist' por nova mondo » kun ĉirkaŭ 150 pagantaj partoprenantoj kaj budo de Espéranto-France.
- De la 13^a ĝis la 20^a de aŭgusto, Christine Brücker organizis la renkonton « FESTetO venas » cele al junuloj, kun 20 partoprenantoj.
- La 14^a Somera Universitato de Eŭropo-Demokratio-Esperanto okazis de la 27^a ĝis la 29^a de aŭgusto.
- La 31^{an} de oktobro, niaj turismaj dungitoj preparis publikan spektaklon de Haloveno, kiu altiris 150 vizitantojn de la regiono.

Ludonoj

Jam la naŭan jaron la Kulturdomo financas sin per ludonoj al privatuloj. Entute kontraktiĝis 28 ludonoj, sed nur 22 realiĝis, precipe pro la sanitara situacio.

Konstrulaboroj kaj vartado de la bieno

Dum 98 tagoj dediĉitaj al laboroj, kaj ankaŭ dum la ludonoj kaj staĝoj, ni daŭrigis la plej diversajn laborojn.

La laboroj por la ĉambro 37 (alirebla per rulseĝo) finiĝis fine de julio per ĝia meblado. La legomĝardeno estis senveprigita, ĝi utilos por la festivalo de FestiNATUR por senstreĉigaj aktivecoj. Kiel daŭrigo de la plej farendaj riparoj, nia tegmentista firmao renovigis la tegmenton de la kampadeja lavejo kaj de la kuireja alo de la kastelo, inkluzivante izolajn. Aŭtomatajn fumdetektilojn, ligitaj al la alarmcentralo, ni instalas en ĉiuj dormĉambroj de la kastelo.

Ni danku al René Jelenc, Bert Schumann, Jannick Huet, Frédéric Lauriol, Yves Couturier, Brigitte Ardon, Nathalie Rigault, Emmanuel Morin, Alain Descarpentries, Guillaume Lanier kaj François Lo Jacomo, kiuj partoprenis tiujn ĉi diversajn staĝojn, luojn kaj volontulajn laborojn en 2021.

Komerca disvolviĝo

Sekve de la esploro farita danke al la 'Loka Progresiga Aranĝo' (DLA), ni daŭrigas la serĉon de klientaro por altigi la enspezojn danke al pli granda okupo de la kastelo, aparte per luadoj ekster la semajnfinoj. Pierre Soubourou, Jannick Huet kaj Catherine Kremer konsistigis laborskupon kun staĝantoj, studentoj pri turismo (Marine ĝis aŭgusto, Flavie kaj Apolline ekde septembro) dungitaj per lernoservaj kontraktoj je reduktita kosto pro ŝtata helpo.

Nova retejo estis kreita kun la adreso chateau.gresillon.org, por klare disigi la esperantistajn kaj komercajn agadojn. Tiu nova retejo proponas ludonon al malgrandaj grupoj dum labortagoj (lunde-vendrede) kaj restadojn enhavantajn specifajn aktivaĵojn.

5) Financa raporto

En ĉi tiu jaro 2021, la klasikaj enspezoj de la Kulturdomo atingis malgraŭ la sansituacio: staĝoj 44 044 € (kontraŭ 28 200 € en 2020 sed 46 153 € en 2019) kaj luoj: 55 474 € (22 281 € en 2020, 68 800 € en 2019). Ekzamenado de la kontoj montras, ke ĉi tiu spezo ebligis kovri la operaciajn kostojn. Donacoj iom malaltiĝis al 12 367 € (– 17%). La ŝtata helpo por kompensi la perdon de aktiveco sumiĝis je 50 000 €, kio rezultigas suman enspezon je 176 727 €; la profito atingas 83 527 € post imposto.

Trian fazon de riparado de la tegmentoj ni plenumis: 33 263 € por la kampadeja lavejo kaj la kuireja alo. La prizorgajn laborojn de la kastela tegmento ni krome pagis 863 €.

La societa kapitalo pliiĝis pri la partoj A: + 224 € ĝis 13 856 € kaj pri la partoj B: +35 000 € ĝis 145 600 €.

Pri la disponeblaĵoj, je la 31^a de decembro 2021, ni havas entute 306 159 €, el tio 12 419 € en ĝirkontoj, 276 114 € en ŝparkontoj kaj 17 626 en societaj partoj de la Popol-Banko.

La prunto de 120 000 € por la renovigo de la tegmentoj estis kontraktita printempe kun 15 societanoj kaj 1 ne-societano por daŭro inter 5 kaj 10 jaroj, kiun ni devos repagi inter 2024 kaj 2033.

La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) ne estas senditaj kun la nuna dokumento, sed publikigitaj en nia retejo.

6) Imputo de la profito 2021

Laŭ niaj statutoj, jen ni proponas al vi aprobi la imputon du la profito en 2021 :

Profito neta post imposto:	83 527,15 €
Imputo al la leĝa rezervo 15 %:	12 529,07 €
Pago de interezoj je societaj partoj B:	1 327,27 €
Dividendo al societanoj:	nenio
Altigo de kapitalo:	nenio
Fonduso de disvolviĝo:	69 670,81 €

7) Buĝeto 2022

Pro la daŭra necerteco ligita al la sanitara situacion, ne eblas al ni proponi klaran buĝeton por 2022, sed oni povas atendi situacion similan al 2021, sen la ŝtata helpo.

10) Programo de 2022

- apr-01/05 Tagoj de "Fervojo kaj Daŭripova Moviĝeblo"
- apr-22/30 staĝo PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj
- maj-04/09 Ĥora renkonto de Interkant kaj E-kurso
- maj-13/16 Kongreso de SAT-Amikaro
- jul-02/03 Festivalo NATURist' kun Esperanto-budo
- jul-04/08 Verda Naturisma Semajno
- jul-11/21 Maratona Esperanto-kurso kaj Konferenco IEK
- jul-25/aŭg-04 Interŝanĝoj de scioj kaj faroj
- aŭg-16/25 Festa Semajno por infanoj kaj familioj
- okt-14/16 Staĝo de dancoj bulgaraj, rumanaj, hungaraj
- okt-17/24 Semajno de esperantlingvaj biciklistoj
- okt-18/23 Ĥora renkonto de Interkant
- okt-24/nov-02 Staĝo AŬTUNE

Vi povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- en nia retejo ĉe: gresillon.org/agendo kaj: gresillon.org/aligho
- rete al: kastelo@gresillon.org aŭ gresillon@gmail.com
- telefone al: +33 2 41 89 10 34 (aŭtomata respondilo) aŭ +33 6 51 24 24 23 (Bert)
- poŝte al: MCE / Schumann, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo bezonas vian helpon! Dankon pro aliĝo kaj aligo de viaj amikoj..

SINPREZENTO DE LA KANDIDATOJ

La 7^{an} de majo 2022, okazos nia Jarkunveno kun novigo je duono de la Administra Komitato. Restas elektitaj ĝis 2024: René JELENC, Xavier GODIVIER, Pierre SOUBOUROU, Espéranto-France, SAT-Amikaro. Ni ricevis kvin kandidatiĝojn por kvin postenoj. Jen la kandidatoj:

Pierre DIEUMEGARD

66jara, mi estas paraplegiulo, do ĉefe interesiĝis dum la pasintaj jaroj pri la nova ĉambro alirebla per rulseĝo. Mi esperas daŭrigi tion dum venontaj jaroj, por ke pli granda parto de la kastelo kaj kromdomoj estu uzeblaj per rulseĝo.

Bert SCHUMANN

61-jara informadikisto, baldaŭ pensiulo, loĝanta en Rennes, germano kaj franco, esperantisto ekde 40 jaroj, familio Esperant-lingva, KER-ekzameno C1, dumviva membro de UEA kaj Espéranto-France.

Societano ekde 2003, mi partoprenas por la administrado, en staĝoj kaj laboroj, por la aktualigo de la retejo gresillon.org. Mi estas por la malfermo al ne-esperantista publiko, tamen privilegianta la esperantistajn aktivajn.

Alain DESCARPENTRIES

Kial kandidatiĝi? La unuan fojon mi eksciis pri Greziljono en la reta kurso: "Saluton, Esperanto, Aŭtodidakte.". Mi poste sekvis kursojn dum "Printempas" kaj sukcesis je la nivelo B1, laŭ la eŭropa referenckadro. Mi provos la nivelon B2 ĉi-printempe. Greziljono estis bela ideo. Ĝi fariĝis granda sukceso. Tio plaĉas al mi.

Kiu mi estas? Emerita instruisto. Sesdek-kvin-jaraĝa. Estro de la retejo de la Esperanto-Klubo de Le Mans. Mi loĝas sufiĉe proksime de Greziljono (kvardek kilometroj). Mi kelkfoje laboris tie: mi farbis plafonojn kun Bert, fosis tranĉeojn kun René, luktis kontraŭ laŭroj en la arbaro... Mi fierus se mi povus partopreni pli en tiu aventuro.

Elisabeth BARBAY

Elisabeth Barbay (1953) Edukistino. Mi esperantistiĝis en 1994 kaj ekkonis Greziljonon en aprilo 1997 okaze de infanstaĝo, en kiu mi partoprenis kun 6 el miaj lernantetoj. Mi plurfoje staĝumis somere kaj gvidis E°-kurson. Inter 2006 kaj 2014, mi organizis kvin infan-renkontiĝojn FRINGOJ (Festa Renkonto INternacia de GeknabOJ) kun fina spektaklo malfermata al ekstera publiko. Ekde 2003 ĝis nun, mi gvidas Esperanto-kursojn en la pariza sidejo de SAT-Amikaro. En julio 2015, mi lanĉis, kun dekduo da geamikoj de la RERS de la 9^a pariza distrikto (reto por interŝanĝo de scioj), nov-stilan renkontiĝon, ne esperantistan : la "Semajnon por sci-interŝanĝoj". En 2021, malgraŭ la viruso, tiu evento kunigis proksimume 45 partoprenantojn.

Mi kandidatiĝas al la komitato por plu kontribui al la kultura vivo de nia E°-Domo.

François LO JACOMO

67-jara emerita instruisto pri matematiko, duonon de mia kariero mi laboris kiel komputisto kaj mi doktoriĝis pri lingvistiko en 1981 per disertacio titolita *Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto*. Esperantisto ekde 1971, mi okupis diversajn postenojn en la Esperanto-movado: nuntempe sekretario de la Akademio de Esperanto, komitatano de UEA kaj reprezentanto de UEA ĉe Unesko, kasisto de Eŭropo Demokratio Esperanto, ...

Mi vizitadis Greziljonon ekde 1972 kaj revenis tien antaŭ dekkvino da jaroj post ĉirkaŭ tridekjara paŭzo. Prezidanto de 2010 ĝis 2016 kaj ekde 2020, mi partoprenis en la financa resanigo de la Kulturdomo de Esperanto: statutŝanĝoj, nova komerca strategio... En 2021, mi prizorgis la 120 000 € pruntadon, enkasigitan post malpli ol kvar monatoj, kiu ebligis fini en 2023 la rekonstruon de la tegmentoj de la kastelo kaj la kromdomoj.